


ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010, U.S.A. Telephone: [415] 343-3844. Editor: Charles R.L. Power. Includes promotional section in English and informational section in Esperanto for ELNA members. Vol. 12, No. 6 November-December 1976.



Left to right: Bill Auld, student Bill Ford, and Jim Cool take a coffee break at SFSU in 1976. Auld and Cool will return to SFSU in 1977, and Cool will direct an Esperanto seminar at Loyola University as well.

CLASSICS TO BE STUDIED IN SAN FRANCISCO

William Auld of Scotland has consented once more to direct a series of courses on Esperanto at San Francisco State University (July 5-22). Assisting him will be James F. Cool of Wilmington College, Ohio.

Auld has already selected texts for the advanced course. Prose will be represented by the original novel *Metropoliteno* (*Subway*) by V. Varankin. The novel, first published in 1933, concerns a Soviet engineer's struggles to get a subway system built in Moscow, despite bureaucratic corruption and personal problems. The structure of the first half is unusual, alternating entries from the diary the engineer keeps during a visit to Berlin with passages from a novel he is writing, based on his experiences in Moscow. Long unavailable to most readers, *Metropoliteno* will be reprinted in Denmark in early 1977.

Another reprint to be studied is *Kvaropo* (*Quartet*), four volumes of poetry bound as one, with early works of Auld, John Dinwoodie, John Francis and Reto Rossetti. On its appearance in 1952, *Kvaropo*, bearing works of four Scottish poets, inaugurated the so-called "Scottish School," of which Auld has become the leading representative. The reprint is being done in Budapest.

Finally, drama will take its part with Auld's long-awaited translation of Shakespeare's *Twelfth Night* (*Epifanio*). This will be the fourteenth complete Shakespeare play to appear in Esperanto, four of the other thirteen having appeared in two translations apiece.

As always, there will be beginning and intermediate courses as well, with the possibility of special workshops on topics such as translation, depending on demand.

WHO SHOULD PAY FOR U.N. LANGUAGES?

The United Nations must start paying the costs for the Arabic language in 1977.

When the General Assembly of the U.N. added Arabic to its official and working languages in 1973, the Arabic-speaking nations agreed to cover the entire cost for the first three years, until the end of 1976. After that date the costs must be paid from the regular budget. The 100 persons working for the Arabic language will be salaried from the U.N. treasury.

Even from the beginning of the U.N.'s existence, the costs of five official languages (English, Chinese, French, Spanish and Russian) have been paid by the U.N. itself.

On July 1, 1975, German was introduced for major U.N. documents. The resulting costs are being covered by three German-language nations: Austria and East and West Germany.

On the occasion of the German language decision by the General Assembly in 1974, the Japanese delegation asserted that it "reserves the right to request the same consideration for Japanese as for German in the future, and under the same financial and administrative conditions," saying that "the principle of payment by the user (of a language) for all direct and indirect costs should be strictly applied to all languages on the basis of fair and equal treatment of all languages."

Would it not be the honest way for each nation whose language is official in the U.N. to participate in covering the costs -- costs, which are wearing away the relatively modest budget of the United Nations?

(Translated from *UN kaj Ni*, no. 2, an informational bulletin of the World Esperanto Association.)

ESPERANTO EVENTS 1977

- February 20/26: International Friendship Week.
- April 1/3: 12th California Esperanto Conference, Asilomar.
- June 13/July 1: Esperanto Language Seminar, Loyola University, Chicago.
- July 5-22: Esperanto Course Series, San Francisco State University.
- July 24-28: 25TH CONGRESS OF ELNA, WASHINGTON DC.
- July 30/August 6: 62ND WORLD ESPERANTO CONGRESS, REYKJAVIK.
- July 30/August 5: 50th Congress of Sennacieca Asocio Tutmonda, Augsburg.
- August 9-16: 33rd International Youth Congress, Poitiers.

ROTARY ASSOCIATION OF ESPERANTISTS

Grahame Leon-Smith, recently elected President of the Rotary Association of Esperantists, has sent out a circular on the reciprocal benefits which could be attained between Rotary International and the Esperanto movement.

Rotary, founded in Chicago in 1905, has widened its scope to become one of the world's best-known international service organizations. Its four-point program includes "the advancement of international understanding, good will, and peace through a world fellowship of business and professional men united in the ideal of service."

The Rotary and Esperanto movements share an ideal of friendship across national borders. The Rotary movement needs Esperanto to tear down the language barrier and work more effectively, while the Esperanto movement needs the help of Rotarians for its own progress, argues Leon-Smith.

Rotarian awareness of the language problem is evident from some of the sentences included (in English, Esperanto, and six other languages) in *A Rotary Phrasebook*, published some years ago by Rotary International in Great Britain and Ireland: "I must apologize for my very bad Dutch, Esperanto, French, German, Italian, Portuguese, Spanish." "I am sorry that I cannot speak...." "Have you a member who speaks English, please?" "I very much regret that I cannot write to you correctly in" "Please excuse me therefore if I continue in English."

The Rotary Association of Esperantists aims to use the international language to further the ideals of Rotary International, facilitate contacts between Rotarians in different countries, help all Rotarians who live or travel abroad, and expand the International Service of Rotary.

Rotarians who approve of these aims should write for further information to Rotarian Grahame Leon-Smith, President, Rotarian Association of Esperantists, Kingburn House, Egam Hill, Egham, Surrey, England TW20 0BD.

Esperantists are encouraged to propose talks on the international language to their local Rotary Clubs, and, where needed, organize Esperanto courses for Rotary Club members.

TRANSLATION COMPETITION ORGANIZED

In cooperation with the British Esperanto Association and the London Esperanto Club, ELNA is organizing an international competition for poetry and prose translations from the English language into Esperanto.

Details on the competition, which has an entry deadline in March, can be found in the Esperanto section of this issue.

DEUTSCHE WELLE RUMOR DENIED

Sources at the Cologne headquarters of Radio Deutsche Welle, the Voice of Germany, deny the rumor printed in *ELNA Newsletter* earlier this year that Deutsche Welle has, or ever had, plans to assume responsibility for the Esperanto broadcasts currently produced and transmitted by Radio Roma, Italy. They will continue from Rome, as before. They are at present weakly audible in Eastern North America, Sundays at 3:00-3:20 p.m., EST (2000-2020 GMT) on all three frequencies, i.e., 7275 kHz (41 m.b.), 9710 kHz (31 m.b.) and 11800 kHz (25 m.b.). One of the latter two frequencies is generally best, but reception varies from week to week.

The erroneous information originated with a West German correspondent.

UNIVERSAL DECLARATION AGAIN AVAILABLE

Thanks to the efforts of the Hon. Ralph Harry, Australian Ambassador to the United Nations (and ELNA member), the U.N. has recently published five thousand copies of the Universal Declaration of Human Rights in the international language. The Esperanto version was previously published by *Universala Esperanto-Asocio*.

The Declaration, proclaimed on 10 December 1948, promotes the observance of a detailed international standard of human rights, "without distinction of any kind, such as race, colour, sex, language, religion, political or other opinion, national or social origin, property, birth or other status" (Article 2). Although it is not recognized as legally binding, some jurists, notably Ivo Lapenna, former president of *Universala Esperanto-Asocio*, have argued that certain words in the U.N. Charter do indeed imply a legally binding character to the Declaration for all member nations. *Universala Esperanto-Asocio*, which has consultative relations with Unesco, has given its whole-hearted support to the Declaration since its proclamation through articles, lectures and other activities.

Those interested should request a copy of the "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj" from the United Nations Office of Public Information, UN Plaza, New York NY 10017. (Although ELNA may acquire its own stock of the Declaration, as many *individual* requests for the Esperanto version as possible will encourage future publication of U.N. documents in the international language.)

GROUP FLIGHTS TO REYKJAVIK



ELNA member and travel agent Janet Brugos has put together several attractive packages for a group flight from New York City to the 62nd World Esperanto Congress in Reykjavik, Iceland (July 30 through August 6, 1977).

Of special interest is a plan which will proceed after the Congress to Luxembourg, for an additional fee of — one dollar! The return flight can be taken independently for up to a year after arrival in Luxembourg. Details on this and other plans were recently sent to all ELNA members.

President of the Local Congress Committee is Baldur Ragnarsson, whose poetry in both Icelandic and Esperanto has won great praise. Ragnarsson will prepare the International Arts Evening of the Congress.

Patron of the Congress will be the President of Iceland, Dr. Kristjan Eldjarn. Members of the Honorary Committee of Patronage include the Bishop of Iceland, the Prime Minister, the Minister of Culture, the Presidents of the Women's Union, Writers' Association and League of Labor Unions of Iceland, and the Mayor of Reykjavik.

Elections for the Executive Board of the Universal Esperanto Association will take place in Reykjavik. Those who attended the 1974 Esperanto Congress in Hamburg will be aware that this can be among the most exciting events of a Congress.

Ms. Brugos has announced that she will arrange a bus charter from the ELNA Congress in Washington, DC, to the flight to Reykjavik from New York, if enough people are interested. Write to Janet T. Brugos, Esperanto Travel Coordinator, Flying Dutchmen Travel, 951 Front St., Novato CA 94947.

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

La pasintaj du-tri jaroj instruis al ni multajn lecionojn. El ili, la plej klara estas la rimarkinda stabileco kaj interna forteco de la Esperanto-movado. Se necesus ankoraŭ pruvi tion, oni povus konstati, ke la Internacia Lingvo fariĝis neevitebla kaj nedetruibla fakto de nia epoko. La kulturo kaj socio de Esperanto estas firma elemento en la nuntempa internacia vivo.

Tio estas pli ol klara en la situacio de UEA mem. Tra ĉiuj perturboj de la tuj pasintaj jaroj, tra ĉiuj krizoj financaj kaj organizaj, UEA tenis la flagon alta kaj laboris diligente por konservi malnovajn gajnojn kaj prepari la grundon por novaj.

Nun ni komencas rikolti la rezultojn de tiu eksterordinara diligento — kaj ankaŭ lojalo — de nia centra stabo kaj nia membraro. En 1975 ni sukcesis registri pozitivan saldon post kelkjaraj deficitaj en niaj financoj. Feliĉe ni povas anonci similan rezulton en 1976. Kvankam la finkalkulo ankoraŭ ne estas preta, estas jam nun informebla, ke 1976 ankaŭ estos jaro de financa pluso. Tiu restarigo de la financa stabileco ankaŭ havis siajn konsekvencojn ĉe la membronombro: post kelkaj jaroj da perdo, en 1976 ni registris malgrandan gajnon en la nombro de individuaj membroj. Se oni aldonas al tio la aliĝon de kelkaj novaj landaj asocioj kaj la signifan plivastiĝon de la kolektiva abonado de la revuo, oni tuj ricevas bildon de asocio pli sekura, pli forta, kaj pli laborpreta ol ni vidis jam de pluraj jaroj.

Dum la venontaj monatoj venos ankaŭ pliaj ŝanĝoj, interalie en reorganizado kaj plifortigo de la Centra Oficejo kaj rilataj instancoj. Dum la pasintaj du jaroj ni jam faris kelkajn paŝojn tiudirekten, precipe per fondiĝo de la Volontula Servo. Ni povas antaŭvidi la formalan starigon de nova, aparta fako pri informado kaj esplorado dum la venontaj monatoj, la eldonon de nova librolisto kaj aliajn elpaŝojn de la Libroservo, kaj signifajn rezultojn de la laboro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kies plifortigita kaj modernigita revuo komencos aperi sub nova vesto ekde la Nova Jaro.

Tiu eksvingo de agado ce UEA stimulas kaj spegulas rimarkindan plivigliĝon sur aliaj terenoj en kaj ekster la Asocio. La eldona agado, ekzemple, precipe pro signifaj kontribuoj el Britujo, Danlando kaj Japanujo, montras refortiĝon kaj novan vervon. Niaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj denove allogas la esperantistojn en kreskantaj nombroj. La kuraĝigaj aliĝociferoj por Rejkjaviko estas nur unu atesto pri tio — kaj la impona nombro da aliĝintoj al la pasintjara TEJO-kongreso memorigas nin, ke precipe la junularo montras novajn fortojn. Ankaŭ la kampo de fakula interesiĝo pri Esperanto konstante firmiĝas — ne nur en Paderborn au Budapeŝto aŭ La Chaux-de-Fonds sed ankaŭ en novaj lokoj kaj ĉe novaj homoj.

Estas bela periodo por labori por Esperanto. Kvankam la publiko restas skeptika, fermita en la propraj intereso, ĉi tiu al la propra prospero — iom post iom, malrapide sed senteble, ni lernas kiel alpaŝi ĝin kaj kiel disciplini nin mem en la intereso de la pli granda idealo. Ĉefe ni ankoraŭ devas lerni kiel konvinki la publikon pri la graveco de la lingva demando — pri la danĝeroj de lingva superregado kaj lingva diskriminacio, pri la kostoj de lingva diverseco, pri la neceso de tutmonda komunikilo — kaj en tiun kuntekston injekti la ideon de la Internacia Lingvo Esperanto, sola praktika solvo de la tutmonda lingva problemo. Por atingi tion, necesas rapide kaj decide plifortigi precipe nian informadon kaj niajn eksterajn rilatojn ĝenerale. Necesas ankaŭ daŭrigi la utiligon de la Volontula Servo, kaj persvadi al niaj membroj dediĉi sin intense al Esperanto pere de tiu servo dum periodoj de ses monatoj, naŭ monatoj, unu jaro.


Aparte gravas, ke niaj aktivuloj, kaj tiuj kiuj ŝatus fariĝi

aktivaj, venu al la 62a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko. Islando ne estas nur interese kaj unika lando (kiu meritas viziton eĉ nur pro tio), sed ĝi ankaŭ estos la loko kie ni fikso nian agadon por la venontaj jaroj, elektos novan Estraron, kaj pridiskutos demandojn signifajn, precipe por la eksteraj rilatoj kaj estonta sukcesigo de Esperanto.

La jaro 1977 portos nin al punkto nur dek jarojn for de la unua jarcento de la Internacia Lingvo. Ĉu tiu dekjara periodo kondukos nin al la sojlo de sukcesigo de la heredaĵo de Zamenhof? Tio dependos grandparte de nia kapablo je sagaco, sindediĉo kaj efika laboro. La jaro 1977, la komenca punkto de tiu eventuale decida jardeko, alportu diligenton kaj laboron, sagacon kaj klarvidon, kaj feliĉon kaj finan sukceson al ĉiuj laborantoj por la Internacia Lingvo. Nome de la Estraro de UEA kaj ĉiuj aliaj aktivuloj en ties organiza strukturo, mi deziras al vi pacan kaj prosperan jaron 1977.

Humphrey Tonkin

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO



Amikeco trans limoj

La Semajno de Internacia Amikeco okazas ĉiun jaron en la lasta plena semajno de februaro. Kvankam nun ĝi estas festata kelkfoje ankaŭ de neesperantistoj, ĝi estis kreita de parolantoj de la Internacia Lingvo por agnoski la valoron kaj plezuron de amikeco trans naciaj limoj per Esperanto.

Oni kelkfoje komparis la esperantistaron en la mondo kun nacia popolo — do iom ŝerce oni povus diri, ke ni estas "internacia nacio." Similecoj ja ekzistas. Ni havas komunajn lingvon, literaturon kaj historion, kiuj komenciĝas per Zamenhof mem kaj pluiras per Universalaj Kongresoj, eldonaĵoj, kaj ĉiuj aliaj aspektoj de la Esperanto-vivo. Montriĝis, ke komunaj tradicioj kaj kutimoj estas gravaj por fortigi kaj vivteni la nacian spiriton de popolo. Tiaj tradicioj kaj komunaj kutimoj certe ankaŭ plifortigas la spiriton de la internacia popolo, la esperantistaro. Ni ja jam havas valoran tradicion, niajn Universalajn Kongresojn. La Semajno de Internacia Amikeco kreas alian tradicion, kiu bonege konkretigas la ideologian elementon de Esperanto: *Amikeco trans Limoj*. Troa kaj falsa akcentado de la ideologio tamen povas doni al ni sektecan stampon kaj tiel malutili al Esperanto. Sed montriĝas, ke se oni ĝuste prezentas la ideon de tiu semajno, nome kontakton kaj amikecon trans naciaj kaj aliaj limoj, ne-esperantistoj ordinare kun simpatio kaj ĝojo akceptas la ideon kaj kune partoprenas en la festado.

La Semajno de Internacia Amikeco havas du pliajn celojn. Unue, ĝi celas plifortigi kaj plivigli la kontaktojn inter esperantistoj en diversaj landoj. Ekzemple ĝi memorigas nin sendi salutojn al esperantistoj, kiujn ni antaŭe renkontis en kongresoj. Due, ĝi havas la celon informi pri nia lingvo kaj movado en neesperantistaj rondoj.

En 1977, SIA okazos de la 20a ĝis la 26a de februaro.

SUGESTOJ PRI AGADO DUM LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

1. UNUOPAJ ESPERANTISTOJ

- a) Sendu amikajn salutojn dum la Semajno al gekonatoj, ne nur al esperantistoj sed ankaŭ al aliaj.
- b) Partoprenu la kunvenojn, kiujn la Esperantaj organizaĵoj aranĝas en via urbo aŭ regiono dum la Semajno.

CLIENTS: To expedite service please note corrections and deletions below and in appendices 5-11. Add \$1.00 shipping (\$2.00 outside U.S.) to all orders. All payment must be made in US\$. Californians please add sales tax. Send all orders to ELNA Book Service, P.O.Box 508, Burlingame, CA 94010.

CORRECTIONS AND DELETIONS (numbers refer to pages of current catalog and previous appendices)

7: NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO	DELETE	39: KONVERSACIA VORTARETO	DELETE
7: ŜLOSILO (Esperanto-English)	.15	39: STRUVELPETRO	7.50
7: VOCABULARY (English-Esperanto, for ŜLOSILO)	.15	39: WINNIE-LA-PU (paperback edition)	DELETE
8: LA DANĜERA LINGVO	DELETE	40: LA DIA KOMEDIO	25.00
10: MEMORLIBRO PRI LA ZAMENHOF-JARO	6.00	Special price for ELNA members	20.00
12: ANSTATATAŬA EDZINO	DELETE	Appx 5: HOW TO UNDERSTAND AND SPEAK	
20: WINNIE-LA-PU (paperback edition)	DELETE	ESPERANTO (textbook)	3.00
23: LA DIA KOMEDIO	25.00	Appx 11: EZOPA SAĜO (Kalocsay)	DELETE
Special price for ELNA members	20.00	Appx 11: SES NOVELOJ (Poe)	DELETE
27: VIVO DE ZAMENHOF	3.50	Appx 11: THE E.U.P. CONCISE ESPERANTO &	
29: LA NOBLA KORANO	17.00	ENGLISH DICTIONARY (Wells)	DELETE

ESPERANTO DOCUMENTS

1.25 ea.

These are individual issues of a series published irregularly by UEA. Subscriptions available at \$9.50/10 issues. Order individual issues by number, please!

NO. 12

1. UNESCO AND THE U.E.A.: The contribution of the Universal Esperanto Association to the work of Unesco, 1954-1974, 8p.
2. UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION: Annual Report 1974-5, 14p.
3. THE 60th UNIVERSAL CONGRESS OF ESPERANTO, COPENHAGEN 1975, 19p.
4. THE DEVELOPMENT OF POETIC LANGUAGE IN ESPERANTO, William Auld, 11p.
5. THE CONTRIBUTION OF THE UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION TO WORLD PEACE, 8p.
6. AN INTRODUCTION TO ESPERANTO STUDIES, Humphrey Tonkin, 12p.
7. ESPERANTO ON THE AIR: A Half-Century of Broadcasting in the International Language, 1922-1975, Humphrey Tonkin, with statistical tables by G. Larglantier, 10p.

KONSILAROJ PRI ESPERANTO-AGADO

Series of UEA publications appearing irregularly, depending on the needs of the moment.

1. AMIKECO TRANS LIMOJ: LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO, 4p. .30
2. LA KONFERENCO PRI SEKURECO KAJ KUNLABORO EN EŬROPO: Malgranda gvidilo al la aplikiĝo de la Fina Akto de la Konferenco en la laboro de la Esperanto-Movado, 8p. + cover. .60
3. REKOMENDITA TERMINARO ESPERANTO-ANGLA POR TRADUKANTOJ DE ESPERANTO-DOKUMENTOJ, 15p. .90
4. FINANCA EVOLUIGO: Manlibro pri la Financa Programo de la Esperanto-Movado, Humphrey Tonkin, 64p. + cover. 2.25
5. ARGUMENTADO POR ESPERANTO: kelkaj dokumentoj pri Esperanto-informado, 4p. .30

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO (INTERNATIONAL FRIENDSHIP WEEK): 1977.02.20/26

RUBBER STAMP with SIA emblem (star, joined hands, slogan "Amikeco trans limoj").



5.00

For information on other SIA materials, send a stamped self-addressed envelope to Ken Thomson, 1802 Edgehill, Pasadena, TX 77502.

OTHER

- FORKAPTITA, Robert Louis Stevenson. Tr. English/Albert Goodheir. ISBN 0 905149 01 7. Glasgow, 1976. iv + 181p., paper. See review elsewhere in this issue. 5.00
- INFORMATION PACK. Back by popular demand, a potpourri of material intended primarily for library vertical files. Contents vary depending on what is available. Current contents (subject to change without notice) include A FIRST FOREIGN LANGUAGE FOR ALL MANKIND, WANTED: A WORLD LANGUAGE, THE ABC'S OF ESPERANTO, ABOUT ESPERANTO, BASIC FACTS ABOUT THE INTERNATIONAL LANGUAGE, MYTH AND FACT ABOUT ESPERANTO, ESPERANTO FOR BEGINNERS. 4.00
- PENTAGONAL PIN. Green star with letter "E" in gold, white background, span about ½". 1.15
- TURISTA KANTARO. Pécs, n.d. 84p., paper. Includes Brecht's Macky Messer (Mack the Knife), Edith Piaf's Himno al amo, Guantanamo, Kalocsay's translation of La Internacio, Rossetti's of La iamo longe for (Auld Lang Syne), in all 58 songs with music. 2.75

LAST MINUTE NOTES: Production of new BOOKLIST pushed back again, to sometime in February. Sorry! New edition of TONKIN BIBLIOGRAPHY, which we have been owing new members for the last year or so, should be ready very soon. Still no word on WELLS DICTIONARY. We recently published an 8-page LIBRARY LIST, which will be included on request with book orders. New subscribers to EL POPOLA ĈINIO (see ad elsewhere) can get free wall calendar (a beauty this year) to end of February.

Pri la Vorto Usono

AL THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Estimata Samideano:

Eble al mi apartenas la honoro, esti la esperantista baptopatro de via lando. En mia libreto *Historio resuma de l' Arbitracio konstanta*, verkita dum la somero de 1904, kaj eldonita en januaro 1905, mi faris efektive la jenan proponon, represitan poste sub la rubriko *Vortaro Pacifisma* en la unua numero de *Espero Pacifista* (julio 1905):

“**Amerikano**, kiu koncernas speciale Unuigitajn Ŝtatojn, aŭ ilian loĝantaron—**Amerikano**, regnanto de Unuigitaj Ŝtatoj.—Vidu: **Usono**.

“**Usono**, Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko.—Strange estas, ke ekzistas neniu nomo por la regnantoj de Unuigitaj Ŝtatoj kaj por ilia nacio. Oni nomas ilin, ĝenerale, **Amerikanoj**; sed tiu nomo estas evidente malpreciza.

“De kelkaj jaroj, oni komencas, en Unuigitaj Ŝtatoj, nomi la landon per la nomo *Usona*, kunmetita per la ĉefliteroj de la vortoj *United States of North America* (Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko); tio, kio koncernas la landon, estas *usonian*, kaj, simile, la regnanto estas nomata *Usonian*. (Same, la konata moknomo *Uncle Sam* (Onklo Sam) devenis de la oficiala mallongigo U. S. Am.).¹ Tiuj nomoj, tre oportunaj kaj bonsonaj, ŝajnas esti disvastigotaj kaj oficiale akceptotaj.

“En Esperanto, mi proponas nomi la landon **Usono**; la responda adjektivo estus *Usona*, kaj la regnanto *Usonano*.

“Eble oni povus diri *Usonujo* aŭ *Usonlando* por la regno, kaj *Usono* por la regnanto. Sed la ĉi superaj vortoj ŝajnas al mi preferindaj.”

Principe, mi uzas en *Espero Pacifista* novajn vortojn, nur en okazo, se, el teknika vidpunkto, ili estas necesaj, por esprimi ideon, por kiu mankis ĝis nun speciala esprimo. Pri **Usono**, kiel ajn necesa ŝajnis al mi la enkonduko de vorto signifanta “regnanto de Unuigitaj Ŝtatoj,” oni povis atendi almenaŭ ĝis kiam la koncernataj esperantistoj, t. e., niaj amikoj el tiu lando, estos konigitaj sian opinion. Mi ne uzis do tiun nomon, kaj daŭris, provizore, diri “Unuigitaj Ŝtatoj” kaj “Amerikano.” Sed, en la septembra numero, mi faris

¹La deveno de “Uncle Sam” estas aparta afero. La entreprenisto, dum nia milito kontraŭ Anglujo, nomigis Elbert Anderson; li provizis nutraĵojn al la militistaro. Liaj skatoloj estis stampitaj “E. A.—U. S.” La nomo de l' inspektoro de l' nutraĵoj estis Samuel Wilson, kiun militistoj ame nomis “Uncle Sam.” Unu ŝercema militisto klarigis ke la literoj U. S. rilatis ne al la Unuigitaj Ŝtatoj sed al “Uncle Sam,” la inspektoro, kaj la ŝercaĵo restis.

eksperimenton: ĉar la vorto **Usono** troviĝis en la titolo de mallonga noto tradukita de unu el niaj kunlaborantoj, mi lasis ĝin, por ekscii kiun efekton ĝi faros, ĉar oni devis ĝin rimarki, pro tio, ke ĝi estis presita per dikaj literoj.

La sola efekto estis malaproba letero de s-ro Twombly,² kiu, versimile, ne estis leginta mian unuan noton, kaj rimarkigis al mi (kion mi sciis), ke la nomo **Usona**, ĝis nun, estas uzata malofte kaj precipe kiel ŝerco. Pri tio, mi respondis per la jena vortara noto, en la decembra numero de la sama jaro 1905:

“**Usono**.—La uzo de tiu vorto, en nia septembra numero, estis tre kritikata en letero de s-ro Twombly. Ni scias ke oni povas fari kontraŭ ĝi tiun kontraŭparolon, ke ĝi ne estas oficiale, eĉ nek ĝenerale uzata en Unuigitaj Ŝtatoj mem. Tial, en la unua parto de tiu vortaro, mi proponis ĝin nur por la estonto, konservante, por la estonto, la vorton *Amerikano*, por montri la regnantojn kaj loĝantojn de Unuigitaj Ŝtatoj: kaj la vorto **Usono** estis uzata nur unufoje en la revuo, de kunlaboranto kies tekston oni ne ŝanĝis. *Amerikano* havas la duoblan malutilon, ke oni ne komprenas ĉiam la diferencon inter ĝi kaj *Amerika*, kaj ke ĝi donas nenium nomon por la regno mem. Kelkaj personoj, mi scias, diras *Unuigo* kaj *Unuiganoj*, kio, ankaŭ, ne estas tre bona. Stranga situacio, tiu de lando kaj popolo sen nomo!”

Sed nun, kiam la vorto **Usono** estas uzata de d-ro Zamenhof, mi opinias ke la estonto, kiun mi aludis en la ĉi supra noto, estas alveninta; kaj mi konsideras do **Usono**; **Usonano** kiel enkondukitaj por anstataŭi la maloportunan *Unuigitaj Ŝtatoj* kaj la neprecizan *Amerikano*.

Mi devas aldoni ke mi scias, ke s-ro Sam. Meyer, el La Rochelle, faris la saman proponon, sed mi tute ne memoras, je kiu epoko. Versimile, le respondos ankaŭ al via demando. Sed, kiu ajn el ni estas kronologie la unua, ĉiu, prezentante sian proponon, ne konis la ideon de l' alia. Ni povas do ambaŭ pretendi la titolon de elpensinto: cetere, du baptopatroj ne estas troaj por tiel granda kaj grava lando!

Pri via demando, ĉu oni devas diri **Usono**

²Nia amiko estis nun kun ni. S-ro Twombly aprobas *Usono*. Vidu lian amikan leteron en la februara numero.—Red. A. E. J.

au **Usonujo**, mi esprimis mian preferon en la unua suprecitata noto. Mia motivo ne estas nur la kompara mallongeco de **Usono**, sed ankaŭ la esenco de la sufikso *uj*. La nomo *Usonujo* signifus, ke via lando estas loĝata de etnike aparta gento, aŭ de popolo parolanta apartan lingvon, propran al ĝi, kaj ke la lando ricevis la nomon de la dirita gento aŭ lingvo. Tia ne estas la okazo, ĉar la Usonanoj estas ja unu el la plej miksitaj popoloj en la mondo, kaj parolas plimulte kaj oficiale la lingvon de le angloj. Al mi ŝajnas do ke oni devas diri *Anglo, Anglujo, Franco, Francujo, kaj Portugal, Portugalujo, sed Usono, Usonano*, same kiel *Brazilo, Brazilano*.

Ekzistas laŭvere en Europo du landoj, Belgujo kaj Svisujo, kies nomoj ne respondas al la ĉi supraj difinoj. Sed vi scias, kiel fortaj estas la naciaj kontrastoj kaj kontraŭstaroj en nia malfeliĉa Eŭropo. Ambaŭ popoloj, la Belga kaj la Svisa, havas, de multaj centjaroj, tiel apartan karakteron kaj historian individuecon, ke, kvankam tute malhomogenaj, ili formas kvazaŭ unuecaj gentoj; kaj la nomo Belgoj estis cetere tiu de antikva gento, kaj Belgujo tiu de Norda Gallujo.

Resume, oni devas diri, laŭ mi, **Usono** kaj **Kanado** por la du nordaj landoj de Nordameriko; por la suda, kies nomo venas de ĝia ĉefurbo, mi konsilas diri *Meksiklando*.

Kredu mia, estimata sinjoro, sincere via,

GASTON MOCH.

Redaktoro de *Espero Pacifista*.
Neuilly-sur-Seine, Francujo.

AL THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Estimata Redaktoro:

Vi petas kritikon pri la vorto **Usono**, kaj tial mi kuraĝas skribi pri ĝi. Oni ofte diras pri Esperanto mem ke ĝi ne estas teorie perfekta, sed ke ĝi ja estas praktika, kaj tio ĉi estas la plej grava afero. Ĉu eble oni ne povus diri same pri **Usono**? Certe, ĝi ne estas teorie perfekta, sed ĝi certe estas praktika, kaj eĉ preskaŭ la sola proponita formo kiu estas praktika. Ni certe ne rajtas alproprigi la nomon Ameriko, kaj estas aliaj "Unuigitaj Ŝtatoj" eĉ en Ameriko mem; ekzemple, la U. S. de Kolombio en Suda Ameriko. **Usono** estas belsona kaj oportuna, eĉ se oni povas demandi, kie estas Ameriko? Ĝi estas jam komprenata, ĉar mi kelkfoje ricevis leterojn en kies adreso ĝi estas uzita. Mi konfesas, ke mi ne tute ŝatis ĝin, kaj jam parolis kontraŭ ĝin, sed mia opinio ŝanĝiĝis post iom da pensado.

Philadelphia, Pa. LEWIS B. LUDERS.

AL THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Estimata Redaktoro:

Unue, mi ne pensas ke "Unuigitaj Ŝtatoj" estas ĝusta termino, ĉar la unio inter niaj ŝtatoj ankoraŭ daŭras; tial "*Unuigitaj*" estus pli taŭga esprimo. Sed, kiu *igis* nin unu? Neniu! Ni mem *unuigis*. Tial, mi prefere dirus "Unuigantaj." Nia unuigo estas daŭra eco, mi pensas. Tial, la ĝusta esprimo estas "Unuigaj Ŝtatoj." Sed el tiu-ĉi, adjektivo ne estas farebla, kaj **Usono** bezoniĝas.

Brooklyn, N. Y. WM. J. PHOEBUS.



La ĉi-supran artikolon ni reproduktas por ĉi tiu numero honore al la ducentjara jubileo de Usono, opiniante, ke malmultaj usonaj esperantistoj nuntempe konscias pri la origino de la esperanta nomo de sia lando. Dankon al s-ino Catherine L. Schulze pro afablaj elfosado kaj pruntedono de la 15a numero de *The American Esperanto Journal*.

Kvankam la nomo de temp' al tempo havis siajn kontraŭulojn--inter kiuj siatempe unu nuna estrarano de CED, kiu proponis la monstraĵon "Amerika Ŝtat-Unio" -- la plej multaj esperantistoj sendube dankas la spiritojn de Moch kaj Meyer, kiuj donacis al ni radikon specifan kaj pluformeblan. Oni rajtas bedaŭri, ke la adjektivo "Usonian" malaperis el la angla.



ZIGZAGE TRA ESPERANTUJO

Michael Jones, filo de nia estrarano R. Kent Jones, efike aktivas por Esperanto en Fort Worth, TX. La trian de decembro li parolis antaŭ la urba konsilio proponante, ke ĉiuj urbaj instancoj ekuzu Esperanton kiel duan lingvon. Li atentigis pri la naciskala kaj mondskala publicado, kiun ĝuis Fort Worth pro tia decido! Artikolo pri tiu propono kaj alia Esperanto-agado de Jones aperis en *Sunday Observer*, 1976.12.19.

Esperanto-Klubo de Los Angeles ekspoziciis ĉe la jarkunveno de Modern and Classical Language Association of Southern California en novembro. Ĉe klubkunvenoj dum la pasintaj monatoj okazis prelegoj de Edward Kalmar pri vizito al Israelo kaj Eŭropo, kaj de William R. Harmon pri progresoj de ELNA. En decembro okazis la tradicia Zamenhof-bankedo.

La Seatla Esperanto-Societo partoprenis la jarkunvenon de Oregon and Washington Foreign Language Teachers Association en oktobro per ampleksa ekspozicio. Esperantisto Sidney Culbert tie prelegis pri la internacia lingvo. Fotoj de SESanoj Vincent Griffith, Leland Ross kaj Raul Miranda aperis en ĵurnalartikolo en *Seattle Times*, 1976.11.13.

Akceptante proponon pri ĝemeliĝo kun Osaka Esperanto-Societo nome de la San-Franciska societo SFERO, ties prezidanto, d-ro B. J. Balcar, skribis: "Tio estas logika konsekvanco kaj kulmino de la antaŭa ĝemeliĝo de niaj urboj, kiuj karaktere tre similas unu la alian. Ambaŭ estas urbegoj; Osaka la dua plej granda en Japanujo, Sanfrancisko la dua plej granda en Kalifornio. Unu situas ĉe Golfo de Osaka, la alia ĉe Golfo de Sanfrancisko. Ambaŭ tiuj golfoj estas ekstremaj de la sama oceano.... En Osaka okazis Universala kaj Internacia Ekspozicio (1970) la unuan fojon en Azio, en Sanfrancisko okazis la 11a Universala Kongreso de Esperanto (en 1915)...."

La novembra kunveno de SFERO ĝuis prelegon pri Unesko, okaze de la 30a datreveno de tiu organizo, de Charles Hackbarth. Ĉe la decembra kunveno Lucy Harmon prezentis lumbildan programon pri sia vizito al Egiptujo kaj Turkujo. SFERO nun starigas propran Belartan Konkurson por originalaj poemoj, prozaĵoj, eseoj kaj drametoj.

Ĉe la oktobra kunveno de Esperanto-Societo de Vaŝingtono parolis Garry Davis, iniciatinto de la Monda Pasporto, pri mondĉivitaneco. Ĉefa prizorganto de la Societo, Sergio Docal, lastatempe sendas siajn tradukojn de artikoloj pri la uzo de la komo kaj pri la krimproblemo en Usono al la membraro.

Vigliĝis la movado en Las Vegas, NV, pro vizito en novembro de ges-roj William H. Schulze al la loka unitariana grupo. Nun kurson tie gvidas Robert McCulloch.

S-ino Lena Adams Schmidt instruas Esperanto-kurson ĉe metodista preĝejo en Spokane, WA, ekde decembro.

Aperis artikoloj pri Roan Orloff Stone lige al ŝia vizito al la ELNA-Kongreso en *Raymond Herald* (Raymond, WA), 1976.07.22, kaj *Daily Republic* (Fairfield, CA), 1976.08.09.

Alaskano Jack Lesh denove vizitas la brazilan esperantistan komunumon Bona Espero. Survoje tien, li estis intervjuita de la radia kaj televida stacio KINY en Juneau por la programo "Elaine's Fifty Minutes."

Pri Betty Walther kaj ŝia Esperanto-agado aperis artikolo en *The Press* (Portland, OR), 1976.08.09. La portlanda societo ESPO renkontiĝis en oktobro por ĝui programon de John Dahnke pri la magnetofonisto en la mondo. En novembro Anne Whitteker parolis pri la Universala Kongreso en Ateno kaj la ELNA-Kongreso en San-Francisko. En decembro estis Zamenhofa/kristnaska/mond-vida festeno ĉe la hejmo de Jim kaj Evelyn Deer.

La 23an de aŭgusto Ralph Dumain prelegis pri Esperanto al klaso de lingvistiko ĉe la Ŝtata Universitato de Nov-Jorkio en Buffalo. Samurbe Dumain, Edward Lindberg kaj vizitanta pola

esperantistino Stanisława Majerczak estis intervjuita ĉe radia stacio WBEN la 31an de aŭgusto. Lindberg interpretis por s-ino Majerczak, kiu parolis pri la pola Esperanto-movado. La programo akceptis telefonvokojn de aŭskultantoj.

La decembra kunveno de Esperanto-Societo de Nov-Jorko okazis ĉe la oficejo de aŭstralia ambasadoro al UN Ralph Harry. Tie oni festis la Zamenhof-datrevenon.

Ĉe la ĉiujara festo por vizitantaj diplomitoj ("homecoming") de Universitato de Kalifornio, San-Diego, Alberta Casey prezentis programon pri la lingvo internacia.

En la novembra numero de *La Koloradia Esperantisto* aperas artikoloj de Jonathan Cole pri la ata-ita disputo kaj pri la historio de mondlingvaj projektoj. Esperanto-Klubo de Kolorado en oktobro akceptis statuton verkitan de Cole.

NOVAJ MEMBROJ

- | | |
|--|-----------|
| 186. Baksik, Henry J. | |
| 24272 Cunningham, Warren, MI 48091 | |
| 187. Cline, Althea R. | |
| 1742 Willow Rd. #402, Palo alto CA 94304 | |
| 188. Florencio, Gastao | |
| 469 Hyman Dr., Dollard des Ormeaux, Quebec, Kanado | |
| 189. Gershon, Janine | |
| 1019 Hillcrest Rd., Beverly Hills CA 90210 | |
| 190. Lambard, Creede | |
| 1144 N. 22nd St., Billings MT 59101 | 40502-192 |
| 191. Mangold, Marteno | 44106-191 |
| 12306 Fairview Ct., Cleveland OH 44106 | 44124-196 |
| 192. Manning, Mark | 48091-186 |
| 233 1/2 Kentucky Ave., Lexington KY 40502 | 59101-190 |
| 193. McCulloch, Robert C. | 59635-194 |
| 6308 Hobart Ave., Las Vegas NV 89107 | 60555-195 |
| 194. Pyfer, S. C. | 89107-193 |
| Box 752, East Helena MT 59635 | 90210-189 |
| 195. Rosenfelder, Mark | 94304-187 |
| 28 W. 261 Main, Warrenville IL 60555 | |
| 196. Savren, Clifford | |
| 32109 Shaker Blvd., Cleveland OH 44124 | |

Por trovi novajn membrojn en via regiono, rigardu la kernajn poŝtkodojn en la dekstra kolono, apud kiuj sidas la korespondaj numeroj de la nomoj en la maldekstra kolono

DONACINTOJ AL ELNA [1976.05.15/10.24]

- | | |
|--|---------------------------------|
| William Auld | Eric Mattews |
| Marion E. Bigelow | Cornelius J. McKown |
| Allan C. Boschen | Prof. J. J. Manson |
| Germaine Chomette | Mill Valley Rondeto |
| Calvin C. Cope | Howard-Clay Morris |
| James W. Deer | Karl Nell |
| Walter A. Donner | D-ro Nguyen-phuoc-Khang |
| Albert k Sara Ann Estling | Alan J. Oberrotman |
| Ella Gibson | Je nomo de Robert Powell |
| Gigi Harabagiu | Thomas S. Reed |
| Adrian Hughes | Jaqueline Reynolds |
| James E. Jenkins, Jr. | William k Cathy Schulze |
| Dorothy C. Jones | Mark Starr |
| Kalifornia Esperanto-Konferenco | Lee D. Stern |
| Jürgen Kuhl | Robin Stone |
| Peggy D. Linker | Francis H. Sumner |
| George Lockhart | E. H. Thompson, Jr. |
| | Doris Worcester |

Sinceran dankon al ĉi tiuj subtenantoj de ELNA kaj tiel de la Esperanto-movado en Usono!

REVUO DE LA REVUOJ

Kontakto n-ro 48 sin dediĉas al la lingvistiko per tri artikoloj, el kiuj unu ("Ĉu ideala sonsistemo?" de Tibor Vasko) aperis jam en *Esperantologiaj Kajeroj* 1. Plej interesas la studo "Esperanto — ĉu eŭropa lingvo?" de Hartmut Trunte.

En *l'omnibuso* n-ro 74 (1976.10/12) aperas la usona novelo "La Terura Antikvulo" de H.P. Lovecraft en traduko de Karl Pov. Samnumere oni trovas la konkludon al "Genia lingvisto venkita de etburĝeco" (reprezo, unue aperis 1931) de E. Spiridoviĉ. La artikolo estas esence remaĉaĵo de la studo *Zamenhof* (1929) de E. Drezen.

La septembra kaj oktobra numeroj de *The Worker Esperantist* komencas fascinante liston de malmultekonataj sed tre utilaj vortoj el *PIV*. Nia rubriko "Riĉigu vian vort-trezoron" ĉerpos el tiu listo.

Rudi Graetz, per recenzo de *Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro* en *Der Esperantist* 4/1976, atentigas pri diferencoj inter kapitalisma kaj socialisma vortuzoj. Laŭ "okcidenta" difino, "labordonanto" estas tiu, kiu dungas; sed, argumentas Graetz, ĉu ne la laboristo donas sian laboron al la produktado?

Hungara Vivo 4/1976 okupiĝas pri kerna parto de nia literatura evoluo: la eldonado esperanta. Vilmos Benczik rimarkas, en historia skizo, ke "La plimulto de la broŝuroj, eldonitaj far Zamenhof, presiĝis en mil ekzempleroj, kaj la meza eldonkvanto de la Esperantaj libroj ĝis nun ne superis tiun nombron." Aparte interesas intervjuoj kun du el la presistoj, per kies laboro povis flori la t.n. budapeŝta skolo dum la intermilitaj jaroj.

La *Revuo Orienta* 11/1976 enhavas pli ol kutime da leginda materialo en Esperanto, kvankam la plejparto restas en la japana. Represiĝas el *Horizonto* "La dua morto de Peter Peneter", parto de intervjuo al Kalocsay far Hauptenthal, kiun la budapeŝta bardo malpermesis publikigi dum sia vivo. Malgraŭ suspekto de multaj li rifuzas konfesi sin aŭtoro de la *Sekretaj sonetoj*, sed informas pri epopeeto postlasita de tiu lasta. Krome aperas letero el Pekino pri lastatempa tertremo.

Alia revuo grandparte japanlingva, *La Movado*, publikigas en sia oktobra numero introspektan, iom obskuran sed mensokaptan poemon de Kuroda Masayuki, "Infan' brogite blovas hezite", kiu gajnis duan premion en literaturkonkurso "Whole World Highway". "Suspekton nutras/bordel", al kies filo/amo mem putras."

La ekŝiĝinta redakcio de *La Juna Penso* ĵus aperigis en simila formato provnumeron de *La Kancerkliniko* (n-ro 0, vintro 1976). Forestas (ĝojinde) la personaj insultoj, kiuj makulis la lastajn numerojn de *LJP*. Enestas interalie traduko de usona sciencfikcia noveleto, "Deflacio 2001" de Bob Shaw. Du artikoloj pri Maŭ Zedong agacas per sia uzo de neesperantaj formoj de ĉinaj propraj nomoj. Ne necesas tiom da serĉado en pekinaj eldonaĵoj por trovi Lin Biau, Ĉiang Kajŝek, Ĝou Enlaj, ktp, kiuj multe pli bone aspektas en teksto esperanta ol Lin Piao, Tĉiang Kai-check, Chou En-lai, ktp.

Bernard Golden, en *Heroldo de Esperanto* 1976.11.16 kaj 1976.12.01, havas artikolon "Forgesitaj anoj de la esperantista popolo - la izoluloj." La situacio de s-ro Golden mem estas neordinara. Li, usonano, edzinigis hungarinon kaj ekloĝis en ŝia lando, sed pro sia manko de hungara civitaneco ne rajtas membrecon en Hungara Esperanto-Asocio. Pli oftaj kategorioj de izoluloj estas la geografie izolitaj kaj la propravolaj ermitoj. Povas esti, ke la ĉefa motivo de tiuj lastaj estas ne, kiel supozas s-ro Golden, honto pri Esperanto, sed malŝato por la loka movado — kiu, sen la ŝanĝoforto de la ermitoj, daŭre stagnas. Infera cirko....

Debutas *Pacifika Lumturo* (aŭtuno 1976), kiu "celas...kunhelpi plivigliĝon de la Esperantomovado en la pacifikaj regionoj en vasta senco, do inkluzive Azion." La redaktoro, Kurisu kei, respondas detale artikolon pri la aziaj Esperanto-movadoj

aperintan en *Esperanto* 1975.07/08. Kaj de Johano B. Se-cien Kao kaj Wong Kenn ni ricevas kelkajn informojn pri la historio de la ĉina movado, kaj pri la aktuala situacio de Esperanto sur la ĉina insulo Tajvano.

La tria numero de la "monata, sendependa, internacia kaj nepolitika gazeto" *Pacifika Esperantisto* alportas novaĵojn kaj kritikojn pri diversaj aferoj. La redaktoro, Zoran Tuŝanov, malaprobas la vortojn *paspartuo* kaj *parvenuo* en *PIV*, kaj invitas aliajn komentojn pri tiu vortaro.

RECENZOJ

Ĝis nun: *Poemoj Originalaj* Daphne Lister. Postparolo de William Auld. Esperantaj Kajeroj. S.u., 1976. 64p. \$1.50.

En tiu ĉi modesta broŝuro la leganto trovos poemetojn, kiuj, malgraŭ ŝtala simpleco kaj mallongeco, tre trafe komunikas la sentojn kaj vivkoncepton de la poetino. Aparte impresas ŝia kapablo lerte ekspluati la apartajn trajtojn de nia lingvo, tiel ke multaj el ŝiaj poemoj povus esti verkitaj "nur en Esperanto."

Tamen, al ŝiaj poemoj mankas la emocia profundeco, kiu troviĝas ĉe multaj el la ĉefverkoj de nia poezio. La emocioj, kiujn ŝi priskribas, estas pli intelektaj. La beleco de ŝiaj poemoj kuŝas ne en esprimo de senbrida pasio, sed en la frapaj manovrado kaj aranĝado de vortoj por des pli efike penetrigi ŝian penson en la cerbon de la leganto.

Multaj el la poemoj rilatas al ŝia iom pesimisma filozofio de la vivo; la necerteco de la estonteco, la tredo de la ĉiutaga rutino, la granda ŝarĝo de la homa konscio pri la propra mortonteco. Tamen, ĉion ĉi ŝi esprimas sprite, kaj sub la pesimismo biletas fajrero de vera vivĝuo.

Jen do kolekto de poemoj, kiujn valoras plurfoje tralegi kaj traĝui.

Recenzis Jonathan Cole

Forkaptita. Robert Louis Stevenson. Elangligis Albert Goodheir. ISBN 0 905149 01 7. Eldonejo Kardo. Glasgow, 1976. iv + 181p. Bros. \$5.00.

Jen klasika kaj distra romano de la brita literaturo, nun legebla ankaŭ en la lingvo internacia. La tradukinto lastatempe ricevis de la itala literatura rondo "La Patrolo" la distigon "Aŭtoro de la Jaro" por 1975, i.a. pro sia multe laŭdata originala poemaro *Merlo sur menhiro* kaj sia traduko de *Bakĥantinoj* de Eŭripido.

La romano pritraktas la aventurojn de juna skoto David Balfour, kiu, en 1751, pro friponeco de onklo volanta senigi lin de grandvalora heredaĵo, fariĝas forkaptito sur ŝipo velanta al Ameriko, kie oni verŝajne lin vendos kiel sklavon. Li el tiu flamo sin tiras kaj en fajron eniras, amikiĝante kun kondamnita jakobisto Alan Brek. Baldaŭ cirkonstancoj ŝajnigas nian heroon komplico en murdo, kaj li kaj Brek devas fuĝi el la skota Altlando ĉasate de ruĝjakaj soldatoj.

La romano estas tre glate legebla, tamen povintus profiti de kelka lingva revizio. Oni trovas jen eraron pri transitiveco, jen malĝustan verbotempon en subpropozicio, jen pleonasman vortkonstruon ("nobelulo"), jen strangan idiotismon. Neangla-lingvano verŝajne mirus pri la koloro de "vere-blua protestanto." Aliflanke la traduko lertege redonas multajn proverbojn, laŭ la modelo se ne ĉiam laŭ la teksto de la zamenhofa proverbaro. "Neniu bato antaŭ konstato", ekzemple, ne estas zamenhofa, sed havas tre zamenhofecan guston.

Enestas bibliografio de Stevenson-verkoj en Esperanto kaj antaŭparolo de William Auld. La kovrilon ilustris Ruth Goodheir. La presmetodo estas tre altkvalita mimeografado.

Recenzis Karl Pov

TRADUK-KONKURSO STARIĜAS

Laŭ propono de nia honora membro William Auld de Skotlando, ELNA, Brita Esperanto-Asocio kaj la Londona Esperanto-Klubo interkonsentis parte ŝtopi la breĉon, kiun lasis la forigo de ĉiuj tradukaj branĉoj el la Belartaj Konkursoj de UEA de post la 60a UK en 1975.

Kiel UEA mem proponis, la nomitaj organizoj decidis starigi traduk-konkurson por sia propra lingva tereno, nome la anglalingva literaturo. Estis proponite, ke UEA donu sian aŭspicion al la konkurso kaj akceptu ĝin en la kadron de siaj Belartaj Konkursoj. La estraro de UEA pritraktos la proponon ĉe sia januara kunsido.

La konkurso havos du branĉojn, poezian (maksimuma longo de poemo de fiksitaj) kaj prozan (maksimuma longo de verko 200 X 65 tajpitaj spacoj). Ĉiu esperantisto rajtas konkursi per ĝis tri tradukoj el la angla lingvo en ĉiu branĉo.

Ĉiu konkursanto devas sendi al la konkursa sekretario kvar kopiojn de ĉiu traduko kune kun kvar kopioj de la teksto de la originalo, kaj kvin internaciajn respondkuponojn (aĉeteblajn en pli grandaj poŝtoŝtupoj) por ĉiu branĉo, en kiu li aŭ ŝi konkursas. La konkursanto signu ĉiun konkursafilon per pseŭdonimo kaj aldonu, en fermita koverto, slipon kun la pseŭdonimo kaj la vera nomo kaj adreso. Sur la koverto aperu la pseŭdonimo kaj la branĉo(j) prenata(j). La tuta konkursa materialo atingu la sekretariojn *plej malfrue la 31an de marto 1977*. Konsentis servi kiel sekretario la aktuala sekretario de la Belartaj Konkursoj, s-ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey, Anglujo SM5 3SE.

Ankoraŭ ne estas definitive decidite, kiam kaj kie anonciĝos la gajnantoj kaj kio estos la premioj. Kiel en la Belartaj Konkursoj, estos tri premioj en ĉiu branĉo, sed la juĝantoj rajtos aljuĝi malpli, depende de la kvalito de la konkursafiloj. (Povus do okazi ekzemple, ke en iu branĉo nur dua kaj tria premioj estos aljuĝitaj.) La premioj dependos de la financado. Ĝis nun oni povas kalkuli je 65 nederlandaj guldenoj por unua premio en ĉiu branĉo; 45 por dua; 25 por tria. (Oni esperas egaligi la premiojn al tiuj de la Belartaj Konkursoj, nome 100, 70 kaj 40 guldenoj, sed tio dependos de disponebla financado.) La rezultatoj anonciĝos plej malfrue en aŭgusto 1977.

Ĉiuj konkursantoj cedas rajton pri unua publikigo de ĉiu premiita konkursafilo al la aŭspiciantaj organizoj. Kompreneble, la organizoj ne publikigos tradukon de verko sub kopirajto sen skriba permeso de la kopirajt-posedanto. Estas esperate, ke premi-gajnantoj uzos parton de sia premio por pagi eventualan tantiemon, tiel havigante al la aŭspiciantoj prespermeson, sed tio ne estas kondiĉo de partopreno aŭ premiigo.

La konkurso havas karakteron de eksperimento. Se la partopreno estos sufiĉe vigla, kaj se eblos organizi konstantan juĝkomisionon kaj havigi konstantan financadon, eble la konkurso pri tradukoj el la angla lingvo okazos refoje en venontaj jaroj.

12A TUTKALIFORNIA ESPERANTO-KONFERENCO OKAZOS ĈE ASILOMAR

La 12a sinsekva "Tut-Kalifornia Esperanto Konferenco" (kiu fakte ĉiun jaron allogis Esperantistojn el aliaj ŝtatoj, ĉar ne estas limigita al nur Kalifornianoj) okazos 1an-3an aprilo 1977 ĉe la belega konferenco-parko de Asilomar, proksime al la konataj lokoj de Carmel kaj Monterey, Kalifornio.

La temo de la konferenco estos "Kiel Esperanto Rolu en la Morgaŭa Mondo?" kaj diskutgrupoj traktos gravajn temojn

kiel "Kiel Efike Argumenti por Esperanto?" kiu estos ankaŭ temo de la Universala Kongreso en Rejkjaviko en 1977. Kiel en antaŭaj konferencoj, ne nur seriozaj diskutadoj troviĝos; ankaŭ okazos kantado, teatraĵoj, deklamoj, kaj multe da neformala renovigo de amikecoj kaj intermiksiĝo kun novaj Esperantistoj.

Ĉar la fama loko Asilomar estas tiel dezirata por konferencoj, spaco estos severe limigita por la Esperanta konferenco. Nur maksimume 130 Esperantistoj povos loĝi ĉe Asilomar, kaj aliĝoj estos akceptitaj laŭ vico de ricevo. Anoncoj estos senditaj al Esperantistoj en la okcidentaj ŝtatoj kun ĉiuj detaloj frue en januaro, 1977.

Informo estas havebla de: ASILOMAR TKEK KOMITATO, 1016 King Drive, El Cerrito CA 94530.

ANONCETOJ

•KVAKERA ESPERANTISTO: Por dujara abono sendu \$8 al la usona peranto, Calvin C. Cope, 2200 Pleasant Valley Road, Aptos, CA 95003. Kvaronjara.

•IPTEA: Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio nun havas nordamerikan peranton. Por detaloj skribu al s-ro J.E. Kitchin, P.O. Box 27, Vancouver, B.C., Kanado V5Y 2L8.

•UNIVERSALA ESPERANTO METODO: Ĉi tiun elĉerpitan lernolibron de d-ro Benson deziregas aĉeti s-ro Shaul Ceder, 1481 Egmont P., Far Rockaway, NY 11691.

•HURA! Kiu vendos aŭ interŝanĝos al mi tiun romanon (1930) de Julio Baghy? Karl Pov, P.O. Box 508, Burlingame CA 94010.

•IEAJ: Por informoj pri Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj ties duonjara organo *Internacia Jura Revuo* skribu al d-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.

•RIFUĜINTOJ EL SAHARO: Kiuj volas kunlabori per helpo, sugestoj aŭ simplaj leteroj skribu al Amika Asocio de la Popolo de Saharo, Strato Vierna y Clavije No. 34-30 H, Las Palmas, Canarias, Hispanujo.

•DIA REGNO: Senpagan specimemon de la KELI-organo sendos kontraŭ afrankita koverto Edwin C. Harler, Jr., 47 Hardy Rd., Levittown, PA 19056.

VOLAS KORESPONDI:

Nsimba Mfumu Ndongala, B.P. 16.332, Kinshasa I, Zairo. Volas ricevi informojn pri Esperanto-movado kaj interŝanĝi PM-ojn.

Peter Petkov, muzikisto, 8000 Burgas, ul. Strandja 1-D, Bulgario

16-jara lernanto *João Maria Pinto*, Rua Ste garibaldi 51, Bairro jardim Floresta, 37200-Lavras-M.G., Brazilo.

Kun 14-16-jara lernanto f-ino *Anna Illés*, 7621 Pécs, Zrinyi Utca 15, Hungario. Kolektas PMojn, insignojn kaj bildkartojn.

Eustaquio Genover, Wi Fredo 2, Palafrugell, Hispanujo.

30-jara instruisto *Mieczysław Porowski*, ul. Dambonia 133/15, 45-774 Opole, Pollando, pri muziko, turismo kaj sporto. Volas interŝanĝi PMojn, bildkartojn kaj gramofondiskojn.

S-ro *Jose Luis Ferreira Sebastião*, Rua do Miradouro n-ro 12, Cacém, Portugalujo.

Por kompletigi lian kolekton de bildkartoj el Usonaj ŝtatoj sendu salutojn el ID, UT, WY, CO, ND, SD, NE, KS, LA, MS, AL, VA, GA, NC, SC al k-do Karel Klein, Cechova 479, 27801 Kralupy III, Ĉeĥoslovakio. Bv. afranki filatele.

17-jara studento *Sebastião Machado Martins*, Rua Albuquerque Lins 1244, BR 17.000-Bauru-SP, Brazilo, kun Usona fraŭlino.

SO YOU WANT TO BE A

UEA REPRESENTATIVE?

The idea of a world network of Esperanto-speaking volunteers to provide information and services to their fellows was proposed at the second World Esperanto Congress (Geneva, 1906), but realized only with the establishment of Universala Esperanto-Asocio in 1908. The network has been active ever since. A volunteer is known as a *delegito* (delegate or representative).

To enter the network one must be 21 years old (16 for Youth Representatives) and an Esperanto-speaking subscribing member of UEA for two years, receiving both its membership organ *Esperanto* and its Yearbook (*Jarlibro*). A subscribing member's spouse who receives the Yearbook is also eligible. Every UEA member may utilize the services of the network.

Only one full representative is allowed for each city. He or she must be ready to give information on work opportunities, tourism, teaching, commerce, and youth, student and women's affairs in that city. An assistant representative substitutes for the representative when necessary. A youth representative (16-30 years old) has much the same kind of duties as a full representative, but is named by TEJO (the World Esperantist Youth Organization).


The most common member of the network, however, is the specialized representative (*fakdelegito*), who volunteers to provide information and services in a particular field. The 1976 UEA Yearbook includes a seventeen-page index by category of all the specialized representatives, in fields ranging from the abacus to zoology, and including stochastics, nudism, comic books, nuclear physics, scientology, telecommunications, labor unions, bookkeeping, mushrooms, the Salvation Army, and genealogy.

A full representative has the privilege of participating more closely in the democratic administration of UEA than other members by electing one member to the Committee (governing body) of UEA for every 250 full representatives. Assistant, youth and specialized representatives do not have this privilege.

All representatives are listed, with address and telephone number, in the UEA Yearbook.

A country with fifteen representatives or more has one Chief Representative, who administers the network and recruits members of the network and of UEA. This office has been filled in the United States for several years by Armin F. Doneis, P.O. Box 105, Pharr, TX 78577. Those interested in becoming representatives should request an application form from Mr. Doneis.

.....



Left to right: ELNA members Ken Thomson and Mr. and Mrs. William H. Schulze meet Mr. and Mrs. E.L.M. Wensing (right) of Belgium during the Zamenhof Society reception in Athens in 1976. Mr. Wensing is a vice president of UEA.


ZAMENHOF SOCIETY SEEKS MEMBERS

One of the ways friends of Esperanto can contribute to the progress of the international language is by joining the Zamenhof Society, an internal group of the Universal Esperanto Association.

The Society is named for the creator (or, as he preferred to be called, initiator) of Esperanto, Dr. Lejzer Ludwig Zamenhof (1859-1917). Publication of the first brochures with the basic grammar and vocabulary of Esperanto was made possible by the financial help of Zamenhof's father-in-law. Members of the Zamenhof Society continue in this tradition by paying an extra membership fee of \$38 to the Universal Esperanto Association (in addition to regular membership dues, \$19).

The Society is under the personal supervision of UEA President Humphrey R. Tonkin, who keeps in touch with the two hundred or so members by special circulars with the sort of informal news on UEA's progress, worries and hopes which it is not always possible to carry in the regular membership organ *Esperanto*. Tonkin carries on a frequent correspondence with many members of the Society, from whom, he reports, many of UEA's best ideas originate. A special reception is held for Zamenhof Society members during each World Esperanto Congress.

Checks for Zamenhof Society membership should be sent, payable to Universala Esperanto-Asocio, to the Association's U.S. agent, Armin F. Doneis, Box 105, Pharr, TX 78577.



Dr. L.L. Zamenhof (seen here with his son Adam at the World Esperanto Congress in Bern, 1913) needed financial help to publish the first brochure on Esperanto in 1887.

[advertisement]

ESPERANTO-LANGUAGE PERIODICALS

Support our publications with your subscriptions and manuscripts!!

Send a self-addressed, stamped envelope to receive an up-to-date pricelist for 17 periodicals published in 12 countries.

ESPERANTO LANGUAGE SERVICE CO.
3300 N. LAKE SHORE DR., 6D
CHICAGO, ILLINOIS 60657

BURG-RYAN TEAM ELECTED TO HEAD ESPERMENSO

Two young ELNA members from Southern California, Brian N. Burg and Timothy J. Ryan, have been elected president and secretary of Espermenso, a special-interest group of Mensa International for Esperanto speakers.

Mensa International is a membership organization with one admission requirement: the achievement of an IQ test score higher than that which could be acquired by 98% of the general population. It should be noted that no claim is made of Mensa members being among the most intelligent two percent of the population, since there is no agreement in Mensa on actual correlation of IQ scores and intelligence, or on the definition of the latter term. Even Isaac Asimov, Honorary Vice-President of Mensa, has argued that IQ scores are meaningless. Be that as it may, Mensa members meet and correspond on all manner of special interests, including archeology, Bahá'í, cryptology, Sherlock Holmes, Scrabble-by-mail and UFOs. However, only five special interest groups, including Espermenso, have been recognized by the International General Committee of Mensa.


Espermenso was founded in 1969 by two Canadian Esperantists, Philip Trubey and Harry Lewis. Its aims are to spread the use of Esperanto in Mensa with the goal of making Esperanto an official language of Mensa, to recruit Esperanto speakers into Mensa, to put Esperanto-speaking Mensans in touch with one another and generally to support an interest in Esperanto and its use.

Newly elected Espermenso president Brian N. Burg, 28, works as a computer systems programmer. He holds a diploma in psychology from the University of Southern California. Among Californian Esperanto speakers he is known as the Esperanto troubador, being a singer and songwriter. Other talents include translation; he has, among other things, collaborated on the translation of a substantial portion of J.R.R. Tolkien's *The Hobbit*.

Timothy J. Ryan, 22, taught himself Esperanto at the age of thirteen. He currently studies history at UCLA, works part-time as an insurance agent, and is president of the Esperanto Club of Los Angeles.

In the latest issue of the Espermenso organ *Esperpenso*, a 1977 new year's resolution is announced: the establishment of a regular Esperanto column in the international Mensa journal.

For information on Espermenso, write to the secretary, Timothy J. Ryan, PO Box 24A45, Los Angeles, CA 90024.



Newly elected Espermenso president Brian N. Burg at the California Esperanto Conference in San Diego, April 1976.

ESPERANTO SEMINAR AT LOYOLA

From June 13 to July 1, 1977, Loyola University (Chicago, IL) will present what may be the first in a series of summer Esperanto seminars, with arrangements for both adults and children. Seminar instructor will be James F. Cool of Wilmington College, Ohio.

Further details will appear here soon. Those interested would be well advised to request an application from the Esperanto Society of Chicago (c/o R. Kent Jones, 3300 N. Lake Shore Dr. 6-D, Chicago IL 60657), as only thirty students will be accepted.



Esperanto League for North America

P. O. Box 508
 Burlingame, CA 94010
 Usono/USA



Nonprofit Organization
 U.S. POSTAGE
 PAID
 Burlingame, CA
 Permit No. 296

NEWS - PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested
 Return Postage Guaranteed